Kristnaskaj paradoksoj

Prologo:

La paŝtistojn alparolas anĝelo el la ĉielo
kaj la tri saĝulojn stelo surĉiela.
Tiu kristnaska mesaĝo konfirmas
la tutjaran veron:
„Sen Dia beno,
vanas homa peno.“

❄

Kristnasko estas kromnomata diversmaniere:
Festo de paco; vintra solstico; festo de infanoj,
familioj; festo de malavareco…

Sed mi mem persone opinias,
ke temas pri la plej granda festo
de paradoksoj.